Adriaen (François) Valéry,

# Kristana kanto

*tradukita de Karl Vanselow*

Al Dio, la lumo de nia espero,
Aŭdiĝu la kanto de nia ador',
Al Dio ni preĝu kun pia sincero,
Ke benu kaj ŝirmu nin Lia favor'.

Li montru la vojon, Li gvidu la sorton
Al suna estonto tra ĉiu nubar',
Al niaj animoj Li donu la forton
Por venki malamon de malamikar'.

Al Dio ni preĝu kun kredo kaj pio,
Al Dio ni fidu kun kora ador'.
Leviĝu ĉielen la melodio
De nia kantado por Lia honor'.

*Traduko de la Nederlanda poemo "Wilt heden nu treden" de* ADRIAEN (FRANÇOIS) VALÉRY *(Adrianus Valerius, ∗1575 – †1620-01-27) en Esperanton de* KARL VANSELOW *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

*Arg-528-1050 (2010-03-24 10:05:00)*

*Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto, Elektita poezio por deklamo kaj kanto, Dua kajero de la unua serio, Dua Ardesia-eldono", verkita kaj eldonita de Karl Vanselow, sur la paĝo 64. Sub la teksto estas indikita: (Verkita laŭ la nederlanda melodio "Wilt heden nu treden". Originalan melodion kreis Rolf W. Althoff.) - Pri la aŭtoro Karl Vanselow legeblas informoj en* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow`.

Adriaen (François) Valéry,

# We gather together

*tradukita de Theodore Baker*

We gather together to ask the Lord's blessing;
He chastens and hastens His will to make known.
The wicked oppressing now cease from distressing.
Sing praises to His Name; He forgets not His own.

Beside us to guide us, our God with us joining,
Ordaining, maintaining His kingdom divine;
So from the beginning the fight we were winning;
Thou, Lord, were at our side, all glory be Thine!

We all do extol Thee, Thou Leader triumphant,
And pray that Thou still our Defender will be.
Let Thy congregation escape tribulation;
Thy Name be ever praised! O Lord, make us free!

*Traduko de la Nederlanda poemo "Wilt heden nu treden" de* ADRIAEN (FRANÇOIS) VALÉRY *(Adrianus Valerius, ∗1575 – †1620-01-27) en la Anglan de* THEODORE BAKER *(∗1851 – †1934).*

*Arg-528-1047 (2010-03-22 21:09:32)*

*Pri la tradukinto Theodore Baker vidu la retejon* `http://www.hymntime.com/tch/bio/b/a/k/baker_t.htm`*. Li angligis la tekston de la kanto laŭ la Germanigo farita de la aŭstro Eduard Kremser (1838 - 1914). Pri Eduard Kremser vidu:* `http://www.hymntime.com/tch/bio/k/r/kremser_e.htm`.